

Termine

Die **wöchentliche Übungsstunde (KLERO)** findet statt donnerstags ab 19:45 Uhr in der „Evangelisch-lutherischen Kirchengemeinde Brake“, Kirchenstraße 24, 26919 Brake.

Unser nächstes **monatliches Treffen** findet im August statt (voraussichtlich am 31.). Datum, Uhrzeit und Treffpunkt können unserer Internetseite <http://www.esperanto.de/unterweser> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen.

Außerdem:

06.07.2005	Gartenfest der Esperanto-Gruppe Bremen bei Ruth Bohn, Tel.: 0421-382715, Bremen
09.07.2005	3. Hamelner Kulturtag, Hameln
13.-20.07.2005	„Internacia Intensa Kurso“, Interkultura Centro Herzberg, Herzberg
23.-30.07.2005	Esperanto-Weltkongress in Wilna, Litauen
24.-25.09.2005	EMAS-Kulturtag in Hannover
26.09.2005	Eŭropa tago de lingvoj - forumo pri la samrajteco de Eŭropaj etnolingvoj, Interkultura Centro Herzberg, Herzberg

Kiu volas partopreni, bonvolu informi nin.

Impressum: **Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.**
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Information und Redaktion: Anne Höpken, Magdalenenstr. 27, 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368
Andreas Kück, Tel.: 04702-5044
Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Für Beiträge und Spenden:

Bankverbindung:
Landessparkasse zu Oldenburg; BLZ 28050100; Kontonummer 298174
(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 13

Jun. – Sep. 05

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>

**Dek-EGU: Zehn Jahre Esperanto-Gruppe Unterweser
Unsere Jubiläumsfeier am 04.06.2005: Seite 2**



**Dek-EGU: Dek jaroj da Esperanto-Gruppe Unterweser
Nia jubileofesto la 4-an de Junio 2005: Paĝo 2**



Esperanto-amikoj el Nederlando, Belgio kaj Germanio sur la historia tabulŝipo *Hanni* sur la Vezero

Nia jubileofesto

Ni festis la dekjariĝon de nia klubo Esperanto-Gruppe Unterweser en ties fondo-urbo Rodenkirchen en la boathavengastejo "Am Sporthafen" ĉe la Vezero. Post longaj planado kaj preparado venis nun la 4-a de Junio 2005. Kun scivolemo ni atendis niajn gastojn el Nederlando, Belgio, Bremen kaj Hessisch Oldendorf. Per



Dörte kaj Anne

"Moin, Moin", "Dag" kaj "Saluton" salutis sin preskaŭ 50 Esperanto-amikoj. La jubileuloj estis preparintaj ekspozicion kun bildoj kaj gazetartikoloj pri la kluba vivo. La ĉeestantoj ĝuis ekskursojn sur la unu kilometron larĝa Vezero per la historia tabulŝipo *Hanni*. Ĝi en sunbrilo ekveturis tuj kun niaj amikoj el Nederlando kaj Belgio. Pro forteta brizo ili estis baptitaj de Vezer-akvo, sed tio ne disrompis la bonan humoron kaj babiladon. Nia afabla mastrino preparis bongustajn salatojn kaj kradrost-viandaĵojn, kiuj al ĉiuj bongustis.

Intertempe estis vigle babilate. Plia ĉefprogramero estis la ĥoro *Hammelwarder Shantychor*. Ĝi prezentis ne nur platgermanajn kaj germanajn maristo-kantojn kaj ŝercaĵojn, sed ankaŭ gratulis la klubon en Esperanto kaj eĉ sukcese instigis la publikon kanti en la lingvo internacia. Jen la speciala parto: La publiko kantis el "Mia Kantaro" de Josef Schiffer el Villingen-Schwenningen "Veladis de Hamburgo kvarmasta ŝip", "Ho, hejm' sub la bel", "La Espero" kaj "Revido nun!". La akordionistino kaj gitaristo de la ĥoro ludis la melodiojn, kaj ilin zumis la ĥoro. Al ĝi ni ilin estis donintaj kelkajn semajnojn antaŭe. Kaj dum la jubileotago ni disdonis la tekstojn al la gastoj, kiuj bone kunkantis. "La Esperanto-movado



Hammelwarder Shantychor

kreskas rapide, ĉar neniam antaŭe mi aŭdis la himnon ludita kaj kantita tiel rapide", diris entuziasma gasto el Frislando. Por danki la ĥoranojn, la publiko kantis pliajn Esperanto-kantojn kiel sian aldonaĵon. La klubanoj dankas ĉiujn gastojn kaj helpintojn por la prospero de tiu ĉi belega kaj neforgesebla jubileofesto. Niaj komencantoj iomete hezitis paroladi Esperanton. Tamen, ili iĝas pli kaj pli bonkuraĝaj. Kaj ili volas deligente ekzercadi kaj jam ĝojas pri venonta renkontiĝo, eble eĉ eksterlande.

– Andreas, Anne, Dörte, Gisela, Renate, Udo-Eugen

Grupvespero de la Esperanto-Grupo Bremen *Kio estas homeopatio?*

La 18-an de Majo 2005, Andreas kaj mi partoprenis la grupvesperon de la Esperanto-Grupo Bremen. D-ro Markus Beckmann prelegis pri la temo "Kio estas homeopatio – alproksimiĝo al alternativa kuracmetodo". Lia prelego estis tre interesa. Li priskribis klare kaj kompreneble la ekeston, principon, efikon kaj aplikon de la homeopatio. Ĉiu malsanulo bezonas sian propran, specialan medikamenton. Por ekscii, kiu medikamento estas ĝusta, la homeopatikuracisto detale devas interparoli kun la paciento. La paciento devas precize priskribi siajn simptomojn, suferon kaj vivmanieron. La kreinto de la homeopatio, Samuel Hahnemann, eltrovis, ke oni similaĵon povas kuraci per similaĵo. Krome la homeopatio celas sanigi tute, ne nur forigi la simptomojn. Kiel priklarigon, kiel la potencigo funkcias, d-ro Beckmann faris praktikan provon. Jen la aparto: ju malpli da prasubstanco en la medikamento, des pli da saniga forto. Estas impone, ke sanigas medikamento, kiu enhavas apenaŭ ankoraŭ la prasubstancon. Estas grave, ke estas alternativa metodo sen kromefiko. Tial ankaŭ sanigo daŭras pli longe ol ĉe la lernejmedicino. Ni dankas por la bona kaj informhava prelego. – Anne

Gruppenabend der Esperanto-Gruppe Bremen *Was ist Homöopathie?*

Am 18.05.2005 nahmen Andreas und ich am Gruppenabend der Esperanto-Gruppe Bremen teil. Dr. Markus Beckmann trug vor zum Thema „Was ist Homöopathie – Annäherung an ein alternatives Heilverfahren“. Sein Vortrag war sehr interessant. Dr. Beckmann beschrieb klar und verständlich den Ursprung, das Prinzip, die Wirkung und Anwendung der Homöopathie. Jeder Kranke braucht sein eigenes, besonderes Medikament. Um zu erfahren, welches Medikament richtig ist, muss sich der Homöopathieweiterbildungsinstitut ausführlich mit dem Patienten unterhalten. Der Patient muss seine Symptome, sein Leiden und seine Lebensweise ausführlich beschreiben. Der Begründer der Homöopathie, Samuel Hahnemann, fand heraus, dass man Ähnliches mit Ähnlichem heilen kann. Außerdem zielt die Homöopathie darauf ab, im Ganzen zu heilen und nicht nur die Symptome zu beheben. Zur Verdeutlichung, wie die Potenzierung funktioniert, machte Dr. Beckmann einen praktischen Versuch. Das Besondere: je weniger Ursprungssubstanz im Medikament, desto mehr Heilkraft. Es ist beeindruckend, dass ein Medikament heilt, das kaum noch die Ursprungssubstanz beinhaltet. Es ist wichtig, dass es ein Heilverfahren ohne Nebenwirkungen gibt. Daher dauert die Heilung auch länger als bei der Schulmedizin. Wir danken für den interessanten und informativen Vortrag. – Anne

Enigma

	1	2	3	4	
1					5
2					
	6				8
3					
4			7		
5					8

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de ĉefurbo de Afrika ŝtato.

Nova: Nia anglalingvo-kurso / Neu: Unser Englisch-Sprachkurs

"Tri sorĉistinoj observas tri Swatch-horloĝojn. Kiu sorĉistino observas kiun Swatch-horloĝon?" / „Drei Hexen beobachteten drei Swatch-Uhren. Welche Hexe beobachtet welche Swatch-Uhr?"

Angle (bonvole laŭtleĝu): / Auf englisch (bitte laut lesen):

"Three witches watch three Swatch watches. Which witch watches which Swatch watch?"

Kaj jen por progresintoj: / Und hier für Fortgeschrittene:

"Tri sekstransformitaj sorĉistinoj observas tri Swatch-horloĝ-butonojn. Kiu sekstransformita sorĉistino observas kiun Swatch-horloĝ-butonon?" / „Drei geschlechtsumgewandelte Hexen beobachteten drei Swatch-Uhrenknöpfe. Welche geschlechtsumgewandelte Hexe beobachtet welchen Swatch-Uhrenknopf?"

Angle (bonvole laŭtleĝu): / Auf englisch (bitte laut lesen):

"Three switched witches watch three Swatch watch switches. Which switched witch watches which Swatch watch switch?"

Horizontale

1: tipo de ŝtofo [sen finaĵo]; **2:** kontinento [sen finaĵo]; **3:** en tago de semajno; **4:** finaĵo de imperativo [unu litero]; **5:** poseda pronomo; **6:** movi ritme la membrojn, kutime akompane de muziko [sen finaĵo]; **7:** herbo, el kies fibroj oni teksas tukojn [sen finaĵo]; **8:** finaĵo de adverbo

Vertikale

1: trinkaĵo [sen finaĵo]; **2:** maltimi; **3:** rilata al ne-edziĝinto; **4:** fortranĉi per du interkruciĝantaj almoveblaj klingoj; **5:** anglalingva mallongigo por komputilo **6:** antaŭ mallonga tempo; **7:** finaĵo de infinitivo; **8:** malekstere

Unsere Jubiläumsfeier

Wir feierten das zehnjährige Bestehen unseres Vereins Esperanto-Gruppe Unterweser in dessen Gründungsstadt Rodenkirchen in der Gaststätte „Am Sporthafen“ an der Weser. Nach langem Planen und Vorbereiten kam jetzt der 4. Juni 2005. Neugierig erwarteten wir unsere Gäste aus den Niederlanden, Belgien, Bremen und Hessisch Oldendorf. Mit „Moin, moin“, „Dag“ und „Saluton“ begrüßten sich etwa



In Erwartung des Hammelwarder Shantychors

begrüßten sich etwa 50 Esperanto-Freunde. Die Jubilare hatten eine Ausstellung mit Bildern und Zeitungsartikeln über das Vereinsleben vorbereitet. Die Anwesenden erfreuten sich an Ausflügen auf der einen Kilometer breiten Weser mit dem historischen Dielenschiff

Hanni. Im Sonnenschein legte es gleich mit unseren Freunden aus den Niederlanden und Belgien ab. Wegen der steifen Brise wurden sie mit Weserwasser getauft, aber das trübte nicht die gute Laune und das Plaudern. Unsere nette Wirtin bereitete leckere Salate und Grillfleischspeisen zu, die allen schmeckten. Unterdessen wurde lebhaft geplaudert. Ein weiterer Hauptprogramm punkt war der Hammelwarder Shantychor. Er bot nicht nur platt- und hochdeutsche Seemannslieder sowie Witze dar, sondern gratulierte dem Verein auch auf Esperanto und schaffte es sogar, das Publikum zum Singen in der internationalen Sprache zu bringen. Und hier der besondere Teil: Das Publikum sang auf Esperanto aus dem Liederbuch „Mia Kantaro“ von Josef Schiffer aus Villingen-Schwenningen „Ick heff mol en Hamborger Veermaster sehn“, „Home on the Range“, „Die Hoffnung“ (Esperanto-Hymne) und „Auf Wiedersehn!“. Der Gitarrist und die Akkordeonspielerin des Chors spielten die Melodien, und der Chor sumpte sie. Dem Chor hatten wir sie einige Wochen zuvor gegeben. Und während des Jubiläumstages verteilten wir die Texte an die Gäste, die schön mitsangen. „Die Esperanto-Bewegung wächst schnell, denn nie zuvor hörte ich die Hymne so schnell gespielt und gesungen“, sagte ein begeisterter Gast aus Friesland. Um den Chormitgliedern zu danken, sang das Publikum weitere Esperanto-Lieder als seine Zugabe. Die Vereinsmitglieder danken allen Gästen und Helfern für das Gelingen dieser sehr schönen und unvergesslichen Jubiläumsfeier. Unsere Anfänger zögerten ein bisschen, Esperanto zu sprechen. Sie werden jedoch immer zuversichtlicher. Und sie wollen fleißig üben und freuen sich schon auf ein nächstes Treffen, vielleicht sogar im Ausland. – Andreas, Anne, Dörte, Gisela, Renate, Udo-Eugen

Rakonto pri la dekjara jubileofesto de la Esperanto-Grupo Subvisurgo en Rodenkirchen la 4-an de Junio 2005

Nia familia Esperanto-lerngrupo estis invitita al la dekjara jubilea aranĝo de la Esperanto-Grupo Subvisurgo. Ni ĝojis pro la invito kaj venis volonte. La festo okazis apud kaj en la gastejo „Am Sporthafen“. Ni alvenis antaŭtagmeze je la dekunua horo. La vetero estis bona, sed venta. Apud la ĉefa gastejo staris granda laŭbo. Nin bonvenigis la klubanoj kaj la kunestantaj gastoj en ĉi tiu laŭbo. Multaj gastoj venis el la urbo Bremen. Unu el ili diris al mi, ke en la urbo Bremen ekzistas du Esperanto-klubo. Uno klubo estas urbklubo, kaj la alia estas la Esperanto-klubo de la fervojistoj. Kelkaj gastoj venis eĉ el Nederlando kaj



Per la Hanni al novaj bordoj


Belgio. La bonvenigo okazis en Esperanto kompreneble. Tio estis mia unua uzado de Esperanto ekster mia lerngrupo. Anne, la prezidantino de la Esperanto-Grupo Subvisurgo, faris bonvenigan paroladon. En Esperanto kompreneble! Mi miregis, ke mi ĉion komprenis. Anne klarigis la planon de la festtago al la gastoj. Antaŭ kaj post la tagmanĝo oni povis veturi per la historia ŝipo *Hanni*. Mi decidis, ke mi veturos per la ŝipo post la tagmanĝo. Por la tagmanĝo la gastejestro kradrostis kolbasojn kaj stekojn. Tiuj manĝaĵoj gustis bone. Posttagmeze, la vetero estis pli bona, ne tro venta, do mi veturis per la ŝipo *Hanni*. La kapitano de la ŝipo nomiĝis Achim. Li donis al la partoprenantoj de la boatveturado multajn interesajn informojn pri la rivero Weser kaj ties apudbranĉo Schweiburg. Kiam ni revenis, ĵus komencis la ĥoro el Hammelwarden kanti maristajn kantojn. Mirege, ke la moderato de la ĥoro parolis kelkajn vortojn kaj frazojn en Esperanto, ĉar li ne estis esperantisto. Sed kiam li ricevis la inviton por kanti okaze de Esperanto-festo, li tuj aĉetis Esperanto-lernlibron. Tio montras, ke Esperanto estas tre facile lernebla. Fine la gastoj mem kantis esperantajn kantojn. Sed ne mi, ĉar mi ne povas bele kanti. Multan dankon al la karaj gastigantoj. Mi nun tre antaŭĝojas partopreni je la UEA-kongreso. – Hans Gerd Müller

Der 100. Geburtstag des ersten Esperanto-Weltkongresses Boulogne2005esperanto, Boulogne-sur-Mer, 25. bis 30. März 2005

Angeregt durch die erste internationale Esperanto-Zusammenkunft zwischen Engländern und Franzosen 1904 in Calais, beherbergten die Esperantisten aus der Nachbarstadt Boulogne-sur-Mer den ersten Weltkongress, und zwar im Beisein von Ludoviko Lazaro Zamenhof. Hinsichtlich der Esperanto-Bewegung und -Entwicklung wurden dort wichtige Dokumente und Entschlüsse verabschiedet: die verbindliche Anwendung des *Fundamento de Esperanto* [„Grundlage des Esperanto“], die Gründung des *Lingva Komitato* [„Sprachausschuss“] (jetzt *Akademio de Esperanto* [„Esperanto-Akademie“]), die Annahme der grünen Standarte der örtlichen Gruppe von Boulogne als Standarte der Esperanto-Bewegung und die *Bulonja Deklaracio* [Boulogner Erklärung]. 2005 wurde die *Bulonja Rekomendaro* [„Boulogner Empfehlungen“] von den insgesamt 550 Esperantisten des Jubiläumskongresses angenommen. Und wie 1905 diskutierten die Teilnehmer nicht nur über Esperanto und seine Zukunft, sondern genossen auch das reichhaltige Programm, das von den Organisatoren angeboten wurde: Eröffnungsfeier, Vorträge, Unterhaltungsabende mit Theateraufführungen und Konzerten, Ausflüge, Bücherverkauf, Platten- und CD-Verkauf von *Vinilkosmo*, Gottesdienst, Examina und Bankette. Die feierliche Eröffnung fand wie 1905 im städtischen Theater statt. Dort sprachen viele wichtige Personen zu uns: u. a. der Bürgermeister, der Vize-Präfekt, die Botschafterin von Polen und der Enkel von L. L. Zamenhof, Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof. Der Esperanto-Schauspieler Arno Lagrange gab gefühlvoll Zamenhofs Eröffnungsrede von 1905 wieder, die die erinnerungswürdigen Worte: „... zwischen den gastlichen Mauern von Boulogne-sur-Mer kamen nicht Franzosen mit Engländern zusammen, nicht Russen mit Polen, sondern Menschen mit Menschen“ enthielt, die während des Treffens in Vorträgen und Diskussionen oft wiederholt wurden. Vom Theater zogen wir parademäßig mit der städtischen Kapelle bis zum Zamenhof-Platz. Dort vor dessen Büste wurden feierlich Blumensträuße zu Ehren von Zamenhof sowie der infolge Deportation gestorbenen Esperantisten und Angehörigen Zamenhofs niedergelegt. Es folgte die „Invasion“ des Rathauses durch die von versprochenen Champagner und essbaren Delikatessen angezogenen Kongressteilnehmer. Der wichtigste Ausflug war der Ausflug *auf den Spuren von Zamenhof*. Wie vor 100 Jahren wurden Calais, Folkestone und Dover besucht. Die Bürgermeisterin von Folkestone empfing uns im *Grand Hotel*. Sie lud uns zu Speisen und Getränken im Festsaal ein. Sie hatte sogar die Rede ihres Vorgängers von 1905 „ausgegraben“ und zitierte sie teilweise. Auch hatte sie keine Mühe gescheut, einige Esperanto-Sätze zu lernen. Alles in allem gefiel mir dieser gelungene Jubiläumskongress sehr, bei dem ich auch alte Esperanto-Freunde wie Carlos aus Belgien traf und ich die Gelegenheit nutzte, ihn zu unserer eigenen Jubiläumfeier einzuladen. – Alke

La 100-jara datreveno de la unua Universala Kongreso de Esperanto Boulogne2005esperanto, Bulonjo-sur-Mar, de la 25 ĝis 30 de Marto 2005

Instigite de la unua internacia Esperanto-kunveno inter angloj kaj francoj en 1904 en Calais, la esperantistoj el la najbara urbo Bulonjo-sur-Mar gastigis, kun la ĉeesto de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la unuan Universalan Kongreson. Tie, koncerne al la movado kaj evoluo de Esperanto, estis alprenitaj diversaj gravaj aktoj kaj decidoj: la deviga uzado de la *Fundamento de Esperanto*, la fondo de la *Lingva Komitato* (nun *Akademio de Esperanto*), la adopto de la verda standardo de la loka grupo de Bulonjo kiel la standardo de la Esperanto-movado kaj la *Bulonja Deklaracio*. En 2005, la *Bulonja Rekomendaro* estis akceptita de



Carlos kaj Alke ĉe l' Zamenhof-busto

la entute 550 esperantistoj de la jubilea kongreso. Kaj kiel en 1905, la partoprenantoj ne nur diskutis pri Esperanto kaj ĝia estonteco, sed ankaŭ ĝuis la riĉan programon ofertitan de la organizantoj: inaŭguron, prelegojn, distrajn vesperojn kun teatraĵoj kaj koncertoj, ekskursojn, libroservojn, diskoservon de *Vinilkosmo*, Diservon, ekzamenojn kaj bankedojn. La solena inaŭguro okazis samkiel en 1905 en la urba teatro. Tie multaj gravuloj paroladis al ni: interalie la urbestro, la vicprefekto, la ĉefkonsulino de Pollando kaj la nepo de L. L. Zamenhof, Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof. La Esperanto-aktoro Arno Lagrange emocie recitis la inaŭguran paroladon de Zamenhof de 1905 enhavintan la memorindajn vortojn: "...inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Mar kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj", kiuj dum la renkontiĝo en prelegoj kaj diskutoj ofte estis ripetataj. De la teatro ni ĉiuj defiladis kun la urba muzikistaro ĝis la placo Zamenhof. Tie, antaŭ ties busto, ceremonie estis almetitaj florbukedoj omaĝe al Zamenhof kaj krome la pro deportado mortintaj esperantistoj kaj parencoj de Zamenhof. Sekvis la "invado" de la urbo-domo fare de la kongresanoj magie altiritaj de promesitaj ĉampano kaj manĝeblaj delikataĵoj. La plej grava ekskurso estis la ekskurso *laŭ la paŝoj de Zamenhof*. Kiel antaŭ 100 jaroj, Calais, Folkestone kaj Dover estis vizititaj. La urbestro de Folkestone akceptis nin en la *Grand Hotel*. Ŝi invitis nin al trinkaĵoj kaj manĝaĵoj en la solena salono. Eĉ la paroladon de sia antaŭulo de 1905 ŝi estis "elfosinta" kaj parte ĝin citis. Ankaŭ ŝi ne estis ŝparinta la penon lerni kelkajn Esperanto-frazojn. Resume al mi tre plaĉis tiu ĉi sukcesa jubileokongreso, dum kiu mi renkontis ankaŭ malnovajn Esperanto-amikojn kiel Carlos el Belgio kaj mi kaptis la okazon inviti lin al nia propra jubileofesto. – Alke

Bericht über die Feier zum zehnjährigen Jubiläum der Esperanto-Gruppe Unterweser am 4. Juni 2005 in Rodenkirchen

Unsere Familien-Esperanto-Lerngruppe war zur Veranstaltung zum zehnjährigen Jubiläum der Esperanto-Gruppe Unterweser eingeladen. Wir freuten uns über die Einladung und kamen gern. Die Feier fand neben und in der Gaststätte „Am Sporthafen“ statt. Wir kamen am Vormittag um 11.00 Uhr an. Das Wetter war gut, aber windig. Neben der Hauptgaststätte stand eine große Laube. Die Vereinsmitglieder und anwesenden Gäste hießen uns in der Laube willkommen. Einige Gäste kamen aus der Stadt Bremen. Einer der Gäste sagte mir, dass es in der Stadt Bremen zwei Esperanto-Vereine gebe. Ein Verein ist Stadtverein, und der andere ist der Esperanto-Verein der Eisenbahner. Einige Gäste kamen sogar aus den Niederlanden und Belgien. Die Begrüßung erfolgte natürlich auf Esperanto. Das war meine erste Anwendung von Esperanto außerhalb meiner Lerngruppe. Anne, die Präsidentin der Esperanto-Gruppe Unterweser, hielt die Begrüßungsrede. Natürlich auf Esperanto! Ich wunderte mich sehr, dass ich alles verstand. Anne erklärte den Gästen den Ablauf des Festtages. Vor und nach dem Mittagessen konnte man mit dem historischen Schiff *Hanni* fahren. Ich entschied, dass ich nach dem Mittagessen mit dem Schiff fahren würde. Für das Mittagessen grillte der Chef der Gaststätte Würste und Steaks. Diese Speisen schmeckten gut. Am Nachmittag war das Wetter besser, nicht zu windig, also fuhr ich mit dem Schiff *Hanni*. Der Kapitän des Schiffs hieß Achim. Er gab den Teilnehmern der Bootsfahrt viele interessante Informationen über den Fluss Weser und dessen Nebenarm Schweiburg. Als wir zurückkamen, begann gerade der Chor aus Hammelwarden, Seemannslieder zu singen. Sehr verwunderlich war, dass der Moderator des Chors einige Worte und Sätze auf Esperanto sprach, denn er war kein Esperantist. Aber als er die Einladung erhielt, anlässlich einer Esperanto-Feier zu singen, kaufte er gleich ein Esperanto-Lehrbuch. Das zeigt, dass Esperanto sehr leicht erlernbar ist. Am Ende sangen die Gäste selbst Esperanto-Lieder. Ich jedoch nicht, denn ich kann nicht schön singen. Vielen Dank an die lieben Gastgeber. Ich freue mich nun sehr darauf, am Kongress des Esperanto-Weltbundes teilzunehmen. – Hans Gerd Müller

Kaj **nia simpatia gasto Carlos el Belgio** skribis pri la jubileofesto de nia klubo, ke li estis tre kontenta pri la bonvenigo. Li trovis la ideon pri la nomafiŝetoj tre oportuna. Li dankas tutkore la prezidantinon Anne por ŝia entreprenemo kaj la iniciato de la festo. Li dankas, ke oni manĝis tre bone, kio ja estas ĉiam tre grava por la gastoj, ke tiuj estis tre afablaj, ke la biero al li tre plaĉis. Krome li dankas siajn amikojn Gerold kaj Alke, kiu estis invitinta lin, pro tio, ke li povis loĝi en ilia domo. Post dek jaroj li volonte revenos por festi la dudekjariĝon de la Esperanto-Gruppe Unterweser. – Alke, Andreas (nome de Carlos)

En Skotlando "malpluvis"

Andreas ĉe la 100-a Skota Kongreso de Esperanto en Largs de la 10-a ĝis 13-a de Junio 2005

La ĉeftemo de tiu ĉi jubileokongreso estis la tiel nomata *skota skolo*. Ĝi estas grupo de elstaraj Esperanto-verkistoj en Skotlando: Reto Rosetti, John Dinwoodie, William Auld, John Francis kaj Albert Goodheir. Al ili estis dediĉataj pluraj prelegoj kaj recitaĵoj, interalie fare de Marjorie Boulton kaj John Francis. El la proksimume 50 kongres-partoprenantoj estis esperantistoj ne nur el Britio kaj Irlando, sed ankaŭ du el Nederlando, kvar el Germanio kaj du elstararaj esperantistoj el Italio: Anna Lowenstein, konata verkistino, kaj Renato Corsetti, UEA-prezidanto. En tre interesa prelego li peris la infanetan procezon de lingvolernado: Ĉe lingvo kun malregulaĵoj, tiujn infanetoj emas reguligi (*I goed*



Andreas sur la insulo Cumbrae



Ĉetable, de maldekstre al dekstre:
Geoffrey Sutton, Ian Mac Dowall, Antje Reeh kaj Wolf Krüger

anstataŭ *I went*). Ĉe Esperanto, infanetoj emas uzadi *mal* (*malpluvas* anstataŭ *estas bela vetero*) kaj krome superreguligon: *Mi muzis en la muzejo* anstataŭ *Mi estis en la muzeo*. En pliaj al mi tre interesaj prelegoj pritraktis Geoffrey Sutton la skandinaviajn lingvojn kaj John Wells la Akademion de Esperanto. Tre distra estis ankaŭ la ekskurso al la insulo Cumbrae: bicikla rondiro, nodo-kurso, koncerto, ekumena Esperantlingva Diservo en la katedralo. Mi tre ĝojas esti partopreninta tiun ĉi elstaran kaj prosperan jubileokongreson. Gratulon al la Esperanto-Asocio de Skotlando. – Andreas

In Schottland „war das Gegenteil von Regen“

Andreas beim 100. Schottischen Esperanto-Kongress in Largs vom 10. bis 13. Juni 2005

Hauptthema dieses Jubiläumskongresses war die so genannte *Schottische Schule*. Das ist eine Gruppe herausragender Esperanto-Schriftsteller in Schottland: Reto Rosetti, John Dinwoodie, William Auld, John Francis und Albert Goodheir. Ihnen waren mehrere Vorträge und Rezitationen gewidmet, u. a. von Marjorie Boulton und John Francis. Unter den etwa 50 Kongressteilnehmern waren nicht nur Esperantisten aus Großbritannien und Irland, sondern auch zwei aus den Niederlanden, vier aus Deutschland und zwei herausragende Esperantisten aus Italien: Anna Lowenstein, eine bekannte Schriftstellerin, und Renato Corsetti, Vorsitzender des Esperanto-Weltbundes. In einem sehr interessanten Vortrag vermittelte er den Sprachlernprozess bei Kleinkindern: Bei einer Sprache mit Unregelmäßigkeiten neigen Kleinkinder dazu, diese Unregelmäßigkeiten regelmäßig zu machen (*ich gehe* statt *ich ging*). Bei Esperanto neigen Kleinkinder zum Gebrauch von *mal* (*malpluvas* [wörtlich: *es ist das Gegenteil von Regen*] statt *estas bela vetero* [*es ist schönes Wetter*]) sowie zum Überregelmäßigmachen: *Mi muzis en la muzejo* statt *Mi estis en la muzeo* (*Ich war im Museum*). In weiteren für mich sehr interessanten Vorträgen behandelten Geoffrey Sutton die skandinavischen Sprachen und John Wells die Esperanto-Akademie. Sehr abwechslungsreich war auch der Ausflug zur Insel Cumbrae: Fahrradtour, Knotenkurs, Konzert, ökumenischer Gottesdienst auf Esperanto in der Kathedrale. Ich freue mich sehr, dass ich an diesem herausragenden und gelungenen Jubiläumskongress teilgenommen habe. Gratulation an den Schottischen Esperanto-Bund. – Andreas

Forpasis Kurt Meyer

Forpasis Kurt Meyer, nia alte ŝatata Esperanto-amiko el la Esperanto-Grupo Bremen. Ni sincere kondolencas al la familianoj.

Kurt Meyer verstorben

Es verstarb Kurt Meyer, unser hoch geschätzter Esperanto-Freund aus der Esperanto-Gruppe Bremen. Wir sprechen den Angehörigen unser aufrichtiges Beileid aus.